

Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago

№7, Julio, 2008

Esperanto-pikniko' 2008

Kara leganto, mi skribas ĉi enkondukan vorton tuj post la okazo de la lasta, espereble, tradicia nia pikniko. Kvankam oni atendis "interŝtatan" ripoz-renkonton kun partoprenantoj el Viskonsino kaj Indiano, kvankam oni atendis pli aktivan partoprenon de l'famaj kaj spertaj ŝikagaj samideanoj (nomojn mi prisilentu), oni devas diri, ke nia arango sukcesis. Dankon al gastigantoj: Roberto kaj Sepideh! Laŭ mi, la plej ĉefa ĝia atingo estis la apero de novaj vizaĝoj, kio simbolas la estontecon de nia E-movado kaj la stafeton inter generacioj. La suban impres-artikolon verkis nia juna samiodeanino, por kiu ĉi evento estis la unua "serioza" E-arango. Mi ekmemoris mian unuan E-tendaron en Ukrainio, ĉe rivero Zbruĉ en 1982: dum tiu renkonto oni fakte malpermesis krokodilo, agis "verda policisto", kiu kontrolis la uzon de la Internacia Lingvo. Do, eble, estontece, io simila okazos ankaŭ en Ŝikago (Ilnoj), kiam sonos nur verda sono de nia kara lingvo.

Grumblis Araneo



Por la tradicia pikniko de La E-Societo de Ŝikago vetero donacis perfektan dimanĉan matenon. Kiam mi proksimiĝis al la fabelaj verdaj-blankaj balonoj, pendigitaj ekstere, mi iomete nervozigis. Tio ja estos mia la plej unua E-evento kaj, honeste, mia la plej unua sperto ekparoli E-on. Tim, mia amiko-"krokodilo", kaj mi estis salutitaj fare de nia gastigantino – Sepideh. Ŝi akompanis nin al la vasta korto malantaŭ la domo. E-istoj daŭre venadis kaj baldaŭ nia verdularo superigis dekon. En tiu kompanio mia nervozeco malaperis: ĉiuj estis amikemaj kaj preskaŭ ne atentigis

miajn parol-erarojn (haste mi diris pri mia pli juna filino anstataŭ fratino, sed oni rimarkis la eraron, kio rezultigis je bonhumora rido). Ni pridiskutis nin, niajn familiojn kaj amikojn, muzikon, librojn, Interreton ktp, ofte ni ŝercis kaj ridis kiel malnovaj amikoj dum la longe atendata renkonto. En niaj agoj estis klare videbla "la interna ideo". Kiel diris Zamenhof, la interna ideo celas "sur neŭtrala lingva fundamento forigi la murojn inter la gentoj kaj alkutimigadi la homojn, ke ĉiu el ili vidu en sia proksimulo nur homon kaj fraton". Nia grupo estis (daŭras al la dorsa paĝo)

(de antaŭa paĝo) bukedo de diversaj etnoj, lingvoj, rasoj, aĝoj, vivspertoj, sed de la momento, kiam ni alvenis sur la korto, ni estis E-istoj en Esperantujo. Eĉ Tim, kiu antaŭ tio ĉi neniam aŭdis ILon, aliĝis al la konversacio kaj ekkomprenis multon eldiritan. Ĉiuj el la grupo parolis al Tim angle pri E-o aŭ simple babilis. Kelkaj najbaroj aliĝis kaj ni spertis “krokodiladon”, sed temis pri E-o. En Esperantujo forestas aliuloj. Abundis bongustaj manĝaĵoj, disputoj, ludoj, muziko kaj aliaj eroj de la mirinda ripoztempo. Mi ankoraŭ neniam sentis min tiel komforte en la kompanio de nekonatoj kaj ricevis tiom da inspiro de iu simila aranĝo. Esperanto ŝanĝas homojn kaj plivastigas horizonton. Ĝi vere ruinigas murojn kaj kreas tutmondan familion, fiera ano de kiu mi estas. Mi dankas ne nur al La E-Societo de Ŝikago, sed ankaŭ al la tuta Esperantujo, kiu estas mia familio kaj mia inspiro.



Darsi ROSS

E-Wikipedio

Meze de Junio la Esperanto-Wikipedio ekhavis 100.000 artikolojn. E-o per tio estas la 20-a lingvo, kiu atingis tiun grandecon. Ĉiutage la E-lingva Wikipedio kreskas per mezume 40 artikoloj kaj kelkaj centoj da aldonoj kaj redaktoj de jam ekzistantaj artikoloj. La limo de 100.000 artikoloj estis atingita la 16-a de junio. Entute la Esperanto-versio de la interreta enciklopedio entenas ĉirkaŭ 19 milionojn da vortoj, mezume estas do 190 vortoj por unu artikolo aŭ 20 linioj da teksto. Metante 600 vortojn sur unu paĝon ebla presita versio havus 30 000 paĝojn aŭ 100 volumojn de po 300 paĝoj. Kelkaj artikoloj entenas nur unu frazon. Aliaj, kiel la artikoloj pri “delfenoj” aŭ pri la “Berlina muro” entenas detalajn prezentojn pri difinita temo.



Ni funebras...

– Altestimata s-ro Walter Cebulski, Bonvolu akcepti la plej sincerajn kondolencojn pro la forpaso de via karmemora edzino Marysia. Ni ĉiuj scias, kiel turmentis vin ŝia malsano, kiel vi malfacile travivis la lastan jaron. Estu forta, ni disdidivas vian malĝojon. Ripozu Ŝia animo pace sur la ĉielo. Ni malĝojas kaj kondolencas...



– La antaŭa prezidanto de UEA, Lee Chong-Yeong (n. 1932), forpasis en Koreio la 4-an de julio 2008 en la aĝo de 76 jaroj. Li laboris kiel ĉefo de la merkatuma grupo de la organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj pri Nutraĵoj kaj Agrikulturo. Kiel prezidanto de UEA Lee Chong-Yeong iniciatis la Nitobe-simpozion, kiu okazis unuafoje en la Universala Kongreso de Esperanto en Prago en 1996.

Jen la informo pri niaj sekvantaj kunsidoj:

22an de Julio – spertulo Karlo Offutt gvidos nian kunsidon

26an de Aŭgusto – ĉiuj raportos pri siaj someraj spertoj kaj aventuroj

23an de Septembro – temo estos anoncata

Adreso (provizora)

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktor' Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org/

Estraro:

Prezidanto – Viktoro Pajuk
Vicprezidanto – d-ro Puramo Chong
Eksprezidanto – Roberto Stalzer
Sekretario – Gertrude Novak, MD
Kasisto – Karlo Gunn

MEMBROKOTIZO

Membro-subtenanto ; \$40 jare;
Familia membro : \$30, Regula: \$20
Studenta aŭ pensiula: \$10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn, 828 S. Ada St,
Chicago IL 60607

KUNSIDO

**okazas kutime la kvaran mardon
de ĉiu monato
en:**

Sulzer Public Library, 4455 N.
Lincoln Ave., Chicago, IL 60625-2101.
Kunvenoj komenciĝas je 7 p.t. en la Suda
Konferenca Salono, unua etaĝo.

